

NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 268

Januaro 2017

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abon-kotizo : 10 €. « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasisto : Jean Colombel, 8 allée des Maraîchers, 76 290 Montivilliers



VIVU 2017 !!! Une Bonne Année !

Oui, et tout d'abord une bonne année 2016 que nous venons de conclure. Certes, nous pourrions être plus nombreux en adhérents et en groupes constitués. En jeunes adhérents également. Il pourrait y avoir plus d'initiatives locales ou d'actions collectives des cinq départements. Nous pourrions mieux et plus communiquer avec les différentes instances départementales et régionales, avec la presse. Nous pourrions ceci, nous pourrions cela si nous avions des ailes, des bras comme Shiva et des gros biscotos. Mais ne faisons pas la fine mouche, l'année 2016 a été plutôt bonne pour notre modeste association.

Tout d'abord, contrairement à l'air du temps, elle se maintient depuis plusieurs années au-delà de 70 personnes à jour de leur cotisation, ce qui veut dire une audience plus large compte tenu de quelques étourdis, de couples ne prenant qu'un abonnement, sans parler des gratuits pour des amis étrangers, des associations sœurs et autres musées.

D'autre part, nous avons pris plaisir à nous rencontrer à notre Assemblée Générale de Montivilliers pendant laquelle nous avons écouté pas moins de trois conférences. Puis en nous retrouvant encore plus nombreux à Granville pour notre deuxième rendez-vous touristique fort réussi (près de la moitié de l'association s'était déplacée !). Qu'est-ce qui nous fait donc courir d'un bout à l'autre de la Normandie, sinon le plaisir de nous retrouver, d'échanger, de papoter en espéranto (et en français, si plus d'affinité...) ?



Sommaire en dernière page !!



Enfin, nous maintenons la cadence de trois bulletins par an grâce à la mise en page de Michèle Langeois et l'arrivée régulière d'articles au contenu très varié, quelques fois et c'est tant mieux fort éloignés de la langue internationale. Soit un total, en 2016, de 14 auteurs pour 38 articles, sans parler des éditos.

Alors, gageons que l'année 2017 sera aussi bonne ! Bonne Année à toutes et à tous. A vos clubs. Un vif succès à notre **Assemblée Générale de Flers le 13 mai** (cochez déjà la page de votre agenda). A notre troisième rendez-vous touristique. Souhaitons de nombreuses rencontres avec des espérantistes étrangers, dans nos terres où lors de voyages et de congrès aux quatre coins du monde. Organisons des expositions, des conférences publiques, adhérons aux associations nationales et internationales. Lisons, correspondons en espéranto. Et de toutes ces activités, de tous nos centres d'intérêt, que fleurissent mille articles pour notre bulletin ! Bonne et Heureuse Année 2017 !

Yves NICOLAS

FIERE FLIRTIS LA VERDA FLAGO SUR « LA MONACO DU NORD » !

La 8an de oktobro okazis vizito de « La Monaco du nord ». Kial **Granville** estis tiel nomita ? Ĉar en 1715 Jacques François Léonor de Matignon edziĝis kun Louise Hippolite, filino de Antoine Grimaldi, princo de Monako. De tiam Granville estas ligita kun Monako kaj kelkfoje ricevas la viziton de la princo. Cetere, ankaŭ la rokoj de Granville kaj de Monako tre similas pro sama kruteo kaj najbareco kun bela maro.

Tridek unu esperantistoj venis de la departementoj Seine-Maritime, Orne, Calvados kaj Manche por viziti nian malnovan urbon. Ne eblis mistrafi la aŭtoparkejon ĉar Christian signalis ĝin per giganta kaj verda flago kiun senmanke ĉiuj loĝantoj kaj turistoj vidis dum la tuta ĉiĉeronado !

En la akceptejo (salono « Régates de Normandie » ĉe la haveno), ili interkonatiĝis dum kafotrinkado kaj aŭskultis Christian pri la historio de Granville kun detaloj pri la tro oftaj militoj inter angloj kaj normandanoj.

La bonetosa grupo laŭiris ofte mallarĝajn stratojn ĝis la Alta Urbo grandparte konstruita sub la regno de Karolo la Sepa. Post klarigoj pri la Granda Pordo kie okazis la vana sturmo de la vendeanoj en 1793, la marŝantoj iom ripozis en la dekkvinjarcenta preĝejo Notre Dame. Ĉiuj poste iris de la maldekstra ĝis la dekstra flankoj de tiu istma urboparto por spekti serenajn kaj plensunan maron kun tradiciaj velŝipoj kaj la silueton de la insuloj Chausey.

Ĉiuj babiladis dum tre agrabla promenado laŭ la remparoj ĝis la kazino kie tre bongustaj manĝaĵoj atendis la malsatajn stomakojn.

Inter du pladoj, Annick, Michelle kaj Christian bele kaj plenvoĉe kantis « la Granvillaise ».

Ni retrovis fortojn por posttagmeze aliri la apudmaran promenejon « Plat Gousset » kaj kuraĝe grimpi klifan ŝtuparon ĝis la Dior Ĝardeno. Por digesti, nenio pli bona !

Dior estis fama modisto kaj lia ĝardeno kun bela mara panoramo plaĉis al ĉiuj.

Klik ! Klik ! Jen fotoj de la tuta grupo por eternigi la momenton !



Nova halto en la bestĝardeno

« Val des Fleurs » kaj refreŝiga trinkado en la matena rendezuejo konkludis tiun belegan tagon sub suno mirinde forta.

La lokaj klubanoj multe kontribuis al la sukceso de tiu dua turista rendezuo de la normanda esperanto asocio : Annick Besneville rezervis la ŝikan saloon en la kazino kaj Céline Dulin la komfortan akceptejon « Régates de Normandie ».

Annick Mulot kaj Françoise Glémot legis slipojn en esperanto pri la renkontitaj vidindaĵoj. Nelly Payen priatentis, ke neniu survoje perdiĝu.

Tio postulis multe da energio antaŭ kaj dum la promenado sed la rekompenco estis legebla sur la vizaĝoj de la vizitantoj.

Ĉiuj nun atendas la Trian Turistan Rendezuon !

Christian Levesque (50- Granville)



Ok membroj de la Eruvila Klubo vizitis Rusion

Finseptembre, ok klubanoj de « Eruvil Esperanto » (Hérouville-Saint-Clair) vojaĝis en Rusio dum du semajnoj. Nome : Francine kaj Jean-Marie Fortin, Brigitte kaj Pierre Cottin, Marie-Anne Piette kaj Claude Ferrand, Véronique Charles, Nicole Jehenne-Ledran.

Ni ĉefe restadis en 3 lokoj : Tiĥvino, Sankta Peterburgo, Moskvo .

De la peterburga flughaveno, ni tuj minibusse veturis ĝis Tiĥvino (ĝemela urbo de Eruvilo) kie ni loĝis ĉe esperantistoj. La familioj de Mikaelo Bronŝtejn, Saŝa Belov, Vera Vlasova kaj Vasili Baraŝkov, Nadejda Ŝestakova kaj Natalia Gazieva tre afable nin gastigadis. Ni ĝuis agrablajn interŝanĝojn en familia etoso.

Dum 3 tagoj ni vizitis la urbon kaj ĝian ĉirkuoĵon, la monaĥejon kun la fame konata ikono kaj la muzeon Rimsky-Korsakov, en la domo mem kie la muzikisto naskiĝis.

Dimanĉe, en arbaro ni piknikis ĉe la « daĉa » de Saŝa kaj manĝis ŝaŝlikojn kaj kolbasojn. Malgraŭ pluveto, la etoso estis tre agrabla, ankaŭ kun gitarludo de Mikaelo Bronŝtejn.

Alian tagon, ni spektis koncerton en la muziklernejo kun surscenaj intervenoj de la esperantistoj Vera Vlasova, Mikaelo Bronŝtejn, Inga kaj ankaŭ de rusostile vestita grupeto. Post la spektaklo, ni kune manĝis kukojn kaj trinkis teon, kafon aŭ sukojn. Lundomatene ni foriris al Peterburgo kiun ni bonorde atingis malgraŭ duhora paneo de la minibuso. Ni estis bonŝancaj loĝi ĉe hotelo « Liebeduŝka » (cigneto) ne for de la fama avenuo Prospekt Newski kaj de multaj vidindaĵoj.

Sankta Peterburgo estas unu inter la plej belegaj urboj en la mondo .Dum nia kvintaga restado ni gavis antaŭ tiom da mirindaĵoj, kiel prexejoj, katedraloj kun buntaj kupoloj kaj ikonostazoj. Dum 2-3 horoj ni admiris pentraĵojn aŭ ikonojn en la famega Ermitaĵo, kaj bedaŭris, ke mankis tempo por admiri plu.

Vespere, ni aŭskultis rusan koncerton de Tureckogo (viroj) kaj Soprano(virinoj) ensembloj kiuj ravis nin Bedaŭrinde, je la fino de la spektaklo, nia klubanino Nicole falis kaj rompis unu lumbvertebron kaj devis esti hospitaligita. Dum ni daŭrigis nian vojaĝon, Nicole multfoje ricevis viziton de lokaj kaj atentemaj esperantistoj, i.a.de Viktor Kandalinski kaj Valerija Cvetkova kiuj faciligis la rilatojn kun la hospitala dungitaro. Esperanto fariĝis tre utila ilo en tiuj malfacilaj kaj dolorigaj momentoj.

Ni ankaŭ ŝipumis por trafi Peterhofon. Belkolora kastelo de la caro Petro la Unua kun granda arbara parko kaj sennombraj fontoj kaj akvofaloj kiuj iele rememorigas Versaĵon.

Per rapida trajno ni atingis nian lastan etapon : Moskvon



Nos amis Dimitri et Svetlana avec Claude, Marie-Anne, Brigitte, Véronique, Francine .

Au dernier rang : Pierre et Jean-Marie .

A droite notre amie Nicole qui s'est malheureusement blessée à Saint Pétersbourg .

Sur la kajo atendis nin Svetlana Smetanina, Dmitrij Osipov kaj Aleksej Rozlov kun verda flago en la mano. Ili montris al ni nian novan hotelon « Cinéma » ĉar multe da afiŝoj pri la 7a arto kovras la koridorojn kaj ĉambrojn

Kun niaj gvidantoj ni laŭiris la plej mirindajn metroostaciojn. Oni senhezite povas aserti ke estas veraj artaĵoj super la kapo de la sennombraj paŝantoj ! Ni ankaŭ vizitis la imponan Kremlon (fortikaĵo en la rusa. Aliaj ekzistas en aliaj urboj, kiel Novgorodo k. a.).

Ni promenadis kun Svetlana sur la Ruĝa Placo kaj vizitis la maŭzoleon de Lenin, la katedralon de La Beata Bazilo kaj la historian Ruĝan Muzeon. Dum la tuta vizito mense ankaŭ akompanis nin la fama kanto de Gilbert Bécaud : « La Ruĝa Placo senhomis. Antaŭ mi marŝis Nathalie. Havis belan nomon mia ĉiĉerono, Nathalie ».

Ni ankaŭ vidis belajn pentraĵojn en Tretiakov Galerio kun klarigoj de profesia gvidantino pri kelkaj verkoj, i. a. la Bojarda Morozova de Surikov.

Marde ni vizitis Pereslav Zalieviski, je 130 kmj de la ĉefurbo. Survoje ni haltis por tuŝi la Bluan Ŝtonon apud la lago Pleŝĉejevo (Plechtcheïevo) kiu onidire donas ŝancon kaj resaniĝon.

En la urbo mem, ni vizitis la faman muzeon Botik Petra kiu memorigas la decidon de la caro Petro la Granda (1688) tie ekkonstruigi sian militŝiparon. Ni ankaŭ ĝuis ege interesan promenadon en ĝiaj multarbaj ĝardenoj.

Ni bone manĝis ĉu en memservaj ĉu en pli ŝikaj restoracioj. Foje oni proponis al ni vodkon , sed kompreneble ĉiuj modere trinkis.

Ni deziras danki la organizintojn, ĉiĉeronojn kaj gastigintoj de tiu bela vojaĝo kiuj tre efike helpis nin admiri tiom da vidindaĵoj kaj po iomete malkovri la rusan animon.

Claude Ferrand (14-Caen)

La klubo de Eruvil organizas tri ĉiusemajnajn kursojn.
 Dum la tria kurso, ni tradukas, ludas, konversacias, kantas laŭ trimestra kaj bunte tema programo
 starigita de kiel eble plej multaj kursanoj.
 Tre ofte **Brigitte COTTIN** proponas kulinaran recepton kaj regalias nin.
 Jen ŝia lasta recepto.

TORTETOJ el SALIKOKOJ, KUKURBO kaj KAREO

INGREDIENCOJ por kvin personoj

- 10 cl da lakto
- 1 ovo
- 1 etakukurbo(*courgette*)
- Foliigita pasto
- 10 kuiritaj rozaj salikokoj
- 2 supokuleroj da olivoleo
- 1 kafokulero da kareo
- 10 gr da butero por buterumi la muldiletojn

KUIRILOJ

- 5 muldiletoj
- 1 salatujo
- 1 pato
- 1 kirlito

PREPARADO

Dek minutojn antaŭe, elfridujigu la paston kaj antaŭvarmigu la bakujon. Metu la varmregulilon je 6 aŭ 180°. Buterumu la muldiletojn.

Senŝeligu kaj pecetigu la kukurbon kaj flave subrostu la pecetojn per oleo en la pato dum kvin minutoj

Senŝeligu kaj tranĉu la salikokojn

Disvolvu kaj sternu la paston

Ŝtancu per muldileto kvin pastajn pecojn. Metu ilin en la muldiletojn.

Dispartigu la salikokojn kaj kukurbojn pecetojn en la muldiletojn

En la salatujon, verŝu la lakton, ŝutu la kareon kaj rompu la ovon.

Kirlu la tuton.

Verŝu tiun miksaĵon en la muldiletojn kaj baku ilin dum 25 minutoj.

Bonan Apetiton !

Konsultadinda retadreso : "Bonan Apetiton" (vegetaraj bongustaĵoj en

Esperanto) : apetito.ikso.net



Brigitte Cottin
(14-Démouville)




ZAMENHOFA TAGO en MALICORNE

La grupo de Flers kvinope (Jean-Pierre Leprévost, Miŝa Chaplain, Zef, Roland Bazin kaj mi) aliris Malicorne (72) por ĉeesti la Zamenhofan Tagon kiun organizis la grupo de Le Mans la 3an de decembro. Ni rendevuis je 9h30 en « Espace de la Faïence » por viziti tre interesajn fabrikejon kaj muzeon pri fajencaj artaĵoj. Kun esperantistoj el Le Mans, Angers kaj Tours, ni tagmanĝis en restoracio « L'Ardoise » kie posttagmeze kantis Famo (Fabrice Morandeau), Pierre Bouvier (Limoges) kaj

Bernard Legeay (Rodez). La triopo bele kaj emociige kantis en esperanto fame konatajn verkojn de Jacques Brel. Ni esperas, ke ili sukcesos en 2017 aperigi K-Don ĉar ilia interpretado forte impresis nin. Dum la revena veturado, ni opiniis, ke tiu spektaklo tre kontribuas al la sukceso de **la normanda ĝenerala asembleo, la 13an de majo !!!**

Anne-Marie Leprévost (61-Flers)



La libro dikas kaj povus timigi pigran leganton. Sed tiu 564 paĝa romano de **Mikaelo Bronŝtejn** estas tiom kaptoprena, ke oni haste legas ĝin de la unua ĝis la lasta paĝoj. Ĝi pritraktas la historion de la sovetia esperanto movado de 1917 ĝis 1938, t. e. de milstela revo ĝis mortiga koŝmaro.

La sorton de miloj kaj miloj da fervoraj esperantistoj jam detale priskribis Ulrich Lins en sia fama kaj legenda verko « La danĝera lingvo »(1). Ĝi enhavis multajn informojn, nomojn, eventojn kaj ege informriĉan analizon de tre fidinda historiisto sed la ĵus aperinta verko de M. Bronŝtejn alportas pluson al tiu dramo ĉar la aŭtoro uzis tiun fontmaterialon kaj sian propran enketon por konstrui tre originalan romanon kies roluloj ekzistintaj aŭ fiktivaj vivas sub niaj okuloj, esperas, amas, fervoras por esperanto, sin kaŝas, forfugâs kaj bedaŭrinde tro ofte mortas pro ĝi.

Paĝon post paĝo konataj esperantistoj kiuj ludis gravan rolon en Sovetunio kaj alie, en la SAT movado aŭ en la franca komunista partio, ktp, miksiĝas kun imagitaj roluloj kies sorto resumas la vivon de tiom da veraj homoj kiuj dum multaj jaroj batalis por pli bona mondo sed estis viktimoj de sistemo baldaŭ freneza kaj sangoavida. La bela Francine vojaĝas kun Lanti, kreinto de SAT, al Moskvo kaj amoras kun Drezen, ĉefo de la bolŝevikaj esperantistoj. Ŝi intime rilatas kun elstara esperantisto Lucien Laurat, unu el la kreintoj de la aŭstria komunista partio kaj amiko de Boris Souvarine, Monatte kaj Victor Serge. Talis, la latva kaj fidela soldato konversacias kun Trotskij. Ŝlomo kaj lia edzino Vera kontribuas al la sukceso de « Vojo Nova », vera nomo de kibuco kreita en Krimeo de judaj revoluciuloj el Palestino (« Vojo Nova » poste iĝis trudita kaj baldaŭ fiaska kolkozo). Survoje oni renkontas Demidjuk, fondinto de la revuo « La Nova Epoko », kaj redaktoro de « Sennacieca Revuo », la esperantan poeton Eŭgeno Miĥalski, la anarkiiston N. Futerfas, la japanon Akita Uĵaku, Nikolaj Nekrasov, Semjon Podkaminer, ktp. Kun soveta oficiro, oni iras ĝis Hispanio teatro de alia dramo kie konataj esperantistoj fariĝis respektitaj militestroj de la respublikanoj (Julio Mangada) ...aŭ en la kampo de Franco (José Perogordo). Kiel en la romano «Dek tagoj de kapitano Postnikov », M. Bronŝtejn enkondukas ĉiun ĉapitron per gazetaj eltranĉaĵoj aŭ oficialaj dokumentoj. Ili ilustras la etoson laŭcirkonstance entuziasman aŭ timigan kaj ritmas la tutan rakonton. Ekzemple : «Rusia Revolucia Proletaro, la unua en la mondo, faliginte la caron kaj la burĝojn, proklaminta en sia lando la Potencon de Laboristoj kaj Kamparanoj,

devas ankaŭ rilate al Esperanto montri ekzemplon la unua : senprokraste deklari al la tuta mondo, ke rusia Laborista Kamparana Respubliko ĉe ĉiuj internaciaj politikaj kaj komerc-industriaj kontaktoj kun aliaj ŝtatoj uzos ekde nun nur la internacian helplingvon Esperanto » (*Artjuŝkin-Kormilicin V.P. La internacio lingvo de la revolucia proletaro. Petrogrado. 1919*). « Pro la intenca kripligo kaj falsigo de ĉiuj informoj pri vivo en Sovetio per la nacilingvaj gazetoj, eksterlanda leganto ofte havas tute malĝustan opinion pri nia lando. Ni uzu la okazon senpere, sen perado de la naciaj gazetfalsigistoj, diskonigi la veron pri Sovetio. En koncizaj, ne tro longaj artikoloj, raportu pri la politika, socia, arta, scienca kaj teknika vivo en nia lando. Traduku artikolojn el niaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj verku mem artikoletojn pri temoj, en kiuj vi estas kompetentaj laŭ via profesio. Per tio vi helpas disŝiri la reton de mensogoj, kiu nin ĉirkaŭas.». (*H. Frank, Leningrad, «Soveta Esperantisto » n° 3, 1925*). « En marto de 1927 pro politikaj persekutoj en Litovio elmigris Sovetion (Moskvon) K-do Stefano Makaraŭskas, pri kiu ĝis nun nenion scias liaj gepatroj, frato k ni, liaj K-doĵ. Ekzistas famoj, ke li estis en Sovetio arestita, juĝita k kondamnita por perfido (?!). Sovetiaj K-doĵ ! Inter vi, certe, ekzistas personoj, kiuj scias, aŭ povas ekscii pri juĝeĵaj k GPU-aferoj dum tiu tempo. Diru veron pri tiu K-do ! Ĉion skribu al J. M. Dagys (SAT-ano 5738) (*« Sennaciulo » n° 7, 1930*). « Mi memoras, ke en 1936 nia linda esperantistino Nataŝa, studentino de agrikultura instituto, ricevis en koverto gazan tuketon kun odoro de franca parfumo. Tio estis evento. Pri tio komunikis urbaj ĵurnaloj kaj la regiona radio. Al ŝi, al Nataŝa, venadis ĉiuj studentinoj por vidi la tuketon. Ŝi estis heroino, ŝi ekgvidis Esperanto-rondeton (...). Post tri monatoj ŝi malaperis. Ŝin kaj ankoraŭ tri kapablajn esperantistinojn (...) arestis NKVD. Antaŭ dudek jaroj ili estis rehonorigitaj, sed lokoj de la ilia enterigo, ve, ne estas konataj ». (*Ŝuvajev Timofej Dmitrijeviĉ, « Konkordo » n° 29, 1995*). La lingvo de Mikaelo Bronŝtejn estas flua en tipe rusa romano kun multaj roluloj kaj personaj, kromaj, karesaj, patronimaj nomoj en kiuj oni ŝatas sin perdi. Longe post la fermo de la libro ni restas kaptitaj de tiu historia romano kiun ilustras bela portreto de Drezen artiste aranĝita de Julia Glinskaja.



i. Greken (Caen)

(1) Nova eldono en 2016 kun aktualigitaj informoj.

LA VIE DE CHÂTEAU POUR APPRENDRE L'ESPÉRANTO

Un séjour linguistique est un excellent moyen pour s'initier ou progresser dans l'apprentissage d'une langue en la pratiquant tout au long de la journée avec des personnes souvent venues de différents pays. « Kvinpetalo » à Bouresse (86) et la « Maison culturelle de l'Espéranto » à Grésillon (49) ont une longue pratique pédagogique et sont facilement accessibles pour les normands. Nous avons interviewé Régine VINCENT (50) sur son expérience récente.

Régine, comment as-tu pris la décision de faire un stage à Grésillon ?

J'avais fait une initiation à L'Espéranto en 2006/2007 et à ce moment-là j'avais entendu parler de Grésillon en beaucoup de bien.

A quelle période y as-tu séjourné et pour quel programme ?

C'était le programme Someras du 7 au 13 août 2016.

Le lieu et les conditions d'hébergement t'ont-ils plu ?

Oui, région très agréable, très beau château qui faute de moyens n'est pas restauré.

Le contenu a-t-il répondu à tes attentes ?

Oui. Cours excellents, très très bien préparés. Méthode pragmatique d'approche communicative et conversation dès le niveau débutant. Pas de traduction, présentation des mots clés avec des exemples.

Qui participait à ce stage, qui l'animait ?

12 nationalités différentes

Animé par Jannick Huet et Bert Schuman le week-end.

3 formateurs exceptionnels : Prezemyslaw Wierzbowski pour le groupe débutant, pour le groupe intermédiaire, Mikaelo Bronštejn pour le groupe avancé.

Quels ont été les moments forts de ce séjour ?

Les cours tous les matins, les rencontres avec les autres participants, les soirées, celle avec le film qui présentait Grésillon à ses débuts et celles avec des chansons que nous reprenions tous en chœur (même si les paroles sont parfois encore restées incomprises pour moi) avec le couple de chanteurs bien connus " Jomart et Nataša " et aussi Mikaelo Bronštejn.

Tes attentes par rapport à l'espéranto ont-elles évolué depuis ce stage ?

Oui, grâce à ce stage, l'Espéranto est passé pour moi d'une langue morte à une langue vivante et je souhaiterais retrouver le même type d'enseignement dans la Manche durant l'année scolaire afin d'acquérir le vocabulaire de la vie de tous les jours pour progresser assez rapidement en compréhension et expression orales

Maison Culturelle de l'Espéranto

Grésillon. 49 150 Baugé-en-Anjou

09 51 64 10 34

kastelo@gresillon.org

Kvinpetalo

Rue du Bureau. 86 410 Bouresse

05 49 03 43 14

informoj@kvinpetalo.org



Devant le groupe :

Jomart.

Premier rang : en partant de la gauche **Nataša** et troisième en partant de la droite **Mikaelo Bronštejn.**

Troisième rang : **Régine Vincent** est la deuxième en partant de la droite.

KAJ ... SE LA MUŜO ?



Homo ŝategus koni alian vivantulon,
Kiel li posedantan veran rezonkapablon.
Ĉevalo, hundo, kato, la plej bone dotitaj
Por kelkaj interŝanĝoj, estas tro limigitaj.
Same pri delfinio kiu pro iaj trajtoj,
Kredigis, sed mallonge, pri raciaj
eseroj.

Homo do sin ekturis al astroj plej
Kiuj en niaj noktoj, ĝis nun restis tro mutaj.
Tial li finpretigis la programegon SETI (1)
Por en la galaksio iomete prospekti.
Sed silentego regas, kaj sola sur la tero,
Homo vane serĉadas en fora stratosfero.

Sed ĉu vere utilas, tiel fore serĉadi,
Ĉu ne eblas ke same, iu provus ekhavi kun
ni interŝanĝadojn kiujn nimiskomprenas ?
Ekzemple, kiam muŝo sur mia nazo venas,
Aŭ tintas fizumante en mian oretruon,
Ĉu hazarde ne estus ...por transdoni
mesaĝon ?

Kaj kiam ĝi insistas mi povas atribui
Al ĝi nur la intencon el mia ŝvito suĉi.
Ĉu mi rajtas aserti ke tiu animalo,
Kiun mi volas puni pro ĝia trudiĝemo,
En lingvaĵo diptera fakte ne provas krei :
« Kiel ci mem mi pensas kaj deziras fratiĝi !



« Jam de multaj miljaroj, ekde la karbonio,
« Ni sekvas la progresojn de cia stranga
speco.
« Ci lernis fari fajron, ci konstruis uzinojn,
« Sed ci miliardoje mortigis niajn avojn.
« Ĉiufoje kiam, senlace ili provis,
« Kun ci havi rilatojn, kial ci malaprobis ?

« Kaj ni ne estas solaj, tutsame la pedikoj,
« Kiujn vi malŝategas, loĝas sur viaj kapoj,
« Nur por esti proksimaj je viaj pensofontoj !
« Sed vi kun fio nomas, tion "pedikulozo",
« Kaj ilin venenigas per via Marie-Rozo ! (2)
« Kaj la etaj formikoj ! Pasas sub viaj pordoj
« Obstine kaj kuraĝe, malgraŭ insekticidoj,
« Ne kun intenco ŝteli sed por havi
kontakton,
« Ĉar ili volus lerni, de vi ... elektronikon ! »

Por senkulpigi homojn, estas la argumento,
Ke la pretendaj fratoj, pri la Komunikado,
Estas tute debilaj. Ĉar kia ideaĉo
Min zumi en orelo, min pumpi en la skalpo !
De tiom da miljaroj ili ne ekkomprenis
Ke tiajn apudiĝojn la homoj malŝategis ?
Se ili ja ŝirmadas verajn pacajn intencojn,
Ili devas modifi, nepre siajn metodojn.

Henri ROUSSEAU (14-Mathieu) ;



- (1) SETI : Usona programo de la NASA :
Search for Extra Terrestrial Intelligence.
- (2) Kontraŭparazita tualetakvo, tre konata en
francio de antaŭ la dua mondmilito.



BELA ARBO EN L'AIGLE

La magazino "Terre Sauvage" kaj ONF (priarbara ŝtata organizaĵo) kreis konkurson por elekti la plej rimarkindan arbon en Francio. Tricentjara platano en L'Aigle estis elektita « Arbo de la jaro 2016 ». Ĝi altas 23 metrojn kaj diametras 14 metrojn.
Tiu bela arbo estas honorigita ĉiun someran dimanĉon, je 17h00, de muzikistoj kaj kantistoj kiuj bedaŭrinde plej multe kantas en la angla lingvo.
Miaopinie, estus tre bone se iu esperantista muzikisto (aŭ muzikanto) proponus al la urbestro koncerti sub la branĉoj de nia fama arbo.

Pascal Hébert (61 . L'Aigle)

Rouen (Matthieu Lecesne)



Saluton,
Mia filino Clémentine naskiĝis la 25a de septembro 2016. Pro tiu kialo mi havis tempon por nenio. Do ne okazas kursoj nuntempe. Mi volas fari ion por la zamenhofa tago (Eble rendevui kun membroj en trinkejo). Bedaŭrinde mi ne povos skribi artikolon.

Matthieu

Pierre Lemarchand (76-Hautot-Sur-Seine)

invitis nin rete akiri la belan kalendaron kies ĉiumonata paĝo provizas nin per amuzaj desegnaĵoj kaj vortaroj pri specifaj temoj .

Jen la retligilo :



http://calendar2017.lingolia.net/lingolia_2017_eo.pdf



**Assemblée Générale de notre association
le 13 mai 2017 à Flers**

ENHAVO

- | | |
|--|--------------------------------|
| P. 1 Édito : les vœux du Président | Yves Nicolas |
| P. 2 La 8 an de oktobro ; vizito de Granville | Christian Levesque |
| P.3 Ok membroj de la Eruvila Klubo vizitis Rusion | Claude Ferrand |
| P.4 Recepto | Brigitte Cottin |
| Zamenofa tago en Malicorne | Anne-Marie Leprévost |
| P.5 " Mi stelojn jungis al revado " de M. Bronštejn | I. Greken |
| P.6 La vie de château pour apprendre l' espéranto | Normanda bulteno et R. Vincent |
| Interview de Régine Vincent | |
| P. 7 Kaj.....Se la muŝo | Henri Rousseau |
| La bela arbo | Pascal Hébert |
| P. 8 Sommaire Kalendaro (Pierre Lemarchand) | |
| Adhésion à l' association normande, des nouvelles de Rouen kajne forgesu ! | |



ADHÉSION à l' association donnant droit au bulletin

Merci de remplir ce bulletin qui nous permettra la mise à jour du fichier des adhérents

NOM.....Prénom.....

Adresse postale.....

.....Tél.....

Adresse électronique.....@.....

Souhaite recevoir	le bulletin papier	oui *	non*
	le bulletin par @	oui *	

* entourer la mention utile

Règle la cotisation donnant droit au bulletin 10€

A régler au trésorier du club ou directement au trésorier de l' association Jean Colombel
(voir coordonnées page 1)